

Pri la libro *Bon voisinage* de Pierre Hirsch  
pri la korespondado de Romain Rolland kun Edmond Privat, 2-a parto  
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 726, 1977.09.07 & 09 & 10

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ĵus eldoniĝis sub la titolo *Bon Voisinage (Agrabla Najbarumo)* la korespodado inter Romain Rolland kaj Edmond Privat kun tre utilaj komentarioj de Pierre Hirsch. Pasintsemajne ni recenzis tiun ĉi verkon. Hodiaŭ ni ĉerpas el ĝi opiniojn de Romain Rolland pri esperanto.

A.- Kronologie la unua mencio de esperanto ligita al Edmond Privat aperas en la tagĵurnalo de Romain Rolland en marto 1916. Oni legas : « *Edmond Privat, redaktoro ĉe la ĵurnalo **Le Temps**, kiu prezentas al mi la filon de la pentristo Hodler, direktoro de esperantista revuo, parolas pri la neeblo skribi la veron en la parizaj ĵurnaloj.* » (p. 37.)

Cl.- Letero de Lanti al Edmond Privat alportas interesajn erojn el letero, kiun Lanti ricevis de Romain Rolland. Laŭ ĝi la franca verkisto estis skribinta al Lanti : « *Mi ne persone konis H. Hodler (p. 51), kiun mi admiras. Mi renkontis lin nur unufoje kaj mi korespondis nur unu- aŭdufoje kun li. [...] Vi devus peti artikolon al Edmond Privat, kiu estis en amikaj rilatoj kun li (lia adreso estas 27, avenue Secrétan, Lausanne). Mi pensas, ke vi konas Ed. Privat, kiu estas fervora esperantisto. [...] Mia espero estas, ke en tio ĉi (temas pri esperanto) kiel por la resto la Soveta Respubliko decidus kaj ke la okcidenta socialismo sekvos. La mond-cerbo de la Laboro nun troviĝas en Moskvo.* » Ni memorigas, ke tiun ĉi leteron skribis Romain Rolland al Lanti en 1920. Lanti laŭ la konsiloj de Romain Rolland petis nekrologian artikolon pri Hector Hodler al Privat. Laŭ letero de Edmond Privat al Romain Rolland de la 27-a de januaro 1936, ni informiĝas, ke la prezento de Hector Hodler al Romain Rolland okazis en Ĝenevo ĉe la hotelo Beau-Séjour. (p.182.)

A.- La gazeto *Le Travailleur espérantiste*, kies reaktoro estis Lanti, publikigis en junio 1919 gravegan leteron de Romain Rolland, kiun siavice Edmond Privat aperigis en la socialista ĵurnalo *Droit du Peuple*. Jen traduko de tiu ĉi teksto, kiu finiĝas en la franca kun vortludo : « *Pour que les peuples s'entendent, il faut d'abord qu'ils entendent.* » : « *Kara Sinjoro, Mi opinias kiel vi. Mi kredas je la absoluta neceso de internacia lingvo, kaj tion mi jam diris en artikolo aperinta en marto-aprilo 1918 en la organo **Revue politique internationale**. Tiam mi indikis, sen elekti inter ili, la du konkurencajn lingvojn : esperanton kaj idon. Nun miaj preferoj ligiĝis al esperanto, kiu, malpli rigide kaj science perfekta ol ido, estas multe pli fleksebla, pli varme nuancita, pli vivanta, pli poezia. Tial mi ege kuraĝigas vin en via propagando. Estas necese atingi, ke en ĉiuj unuagradaj lernejoj eŭropaj esperanto estu oficiale instruata kaj fariĝu lerndeviga. Ne povas ekzisti sen ĝi solida kaj daŭra rimedo al internacia alproksimiĝo. Por ke la popoloj sin reciproke komprenu, estas necese, ke unue ili aŭdu ! Esperanto redonu la aŭdpovon al tiuj surduloj, kiuj, ekde jarcentoj, estas enkarcerigitaj en la propra lingvo ! Kore via Romain Rolland.* » (p. 50.)

Cl.- En novembro 1920 Romain Rolland skribe dankis Edmondon Privat pro lia *Vivo de Zamenhof*, kaj tiu ĉi letero pravas, ke la franca verkisto nur legis esperanton, sed ne kapablis ĝin skribi aŭ paroli. Jen ni traduke citas tiun ĉi interesan dokumenton : « *Kara sinjoro Edmond Privat, Koran dankon pro via **Vivo de Zamenhof** kaj pro la amikaj vortoj, kiuj ĝin akompanis. Kiom mi ŝatus esti koninta tiun bonan sorĉiston, kiu venis redoni al la laboristoj de la babela turo la unuecon de ilia perdita lingvo, tiun revoluciulon, kiu evitas perforton por starigi novan regnon ! Tion mi almenaŭ vidas nun tra viaj okuloj. Sed oni ne devas*

*bedaŭrinde fari al mi komplimentojn, kiujn mi ne meritas. Mi kapablis eksenti la harmonion de esperanto kaj la genion de ĝia kreinto. Sed mi ne parolas lian lingvon. Mi ankoraŭ apartenas al la maljuna stulta generacio franca, kiu tiel mallertis en la lernado de ĉiuj ceteraj lingvoj escepte la sian. Mia mallaboremo tiomas, ke nur du aŭ tri mi kapabletas legi. Sed neniun mi skribas – escepte tiun de mia avo Colas Breugnon. Kore via Romain Rolland. » (p. 52-53.)*

A.- Pri esperanto kaj ido en rilato kun Edmond Privat la tagĵurnalo de Romain Rolland en 1928 donas tiun ĉi interesan sciigon : « *La geedzoj Privat ĵus faris vojaĝon en Svedio, kie, dank'al esperanto (kies unu el la estroj estas Privat) ili povis sen malfacilo ĉie konversacii kun popolanoj. Privat asertas, ke venke nun gajnis esperanto super la rivaloj. Ido forlasis la batalon ; kaj la konkurencaj lingvoj ĝin anstataŭintaj sin reciproke detruas per superpropono al absoluta perfekteco. – Esperanton vivigas ekde nun **genia poeto**, hungaro, kaj pluraj talentaj verkistoj venintaj el la sama landaro. » (p. 55.)*

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Claude kaj Andrée Gacond ĉerpis el la libro *Bon Voisinage* de Pierre Hirsch vidpunktojn de Romain Rolland pri esperanto. Ĝis reaŭdo !

---

Kopirajto © Claude GACOND, [www.esperanto-gacond.ch](http://www.esperanto-gacond.ch)  
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), septembro 2012